



# KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA  
KAJ KULTURA REVUO

NUMERO 3-4 (221-222)  
JULIO-DECEMBRO 2009  
VOLUMO 43

**2009 3-4**

Editeur : MCE, Grésillon, 49150 Baugé, France.  
Directeur de publication : Dominique Bertrand.  
Imprimeur : D. Bertrand, MCE, Grésillon, 49150 Baugé.  
Dépôt légal novembre 2009. ISSN 1272-5188. 2 €.

## Abonu Kulturajn Kajerojn por 2009

Se vi ne jam pagis vian abonon por 2009,  
tuj sendu 10 eŭrojn al  
« Maison culturelle de l'Espéranto »  
kaj informu pri tio al  
Dominik Bertrand, 7, rue des Brûlis, 77320 Jouy-sur-Morin, France  
« nasf2008@orange.fr »

Kaj estontece ?  
Nepre ne jam abonu la revuon por 2010 !  
ĉar ni ankoraŭ ne scias, ĉu la revuo plu aperos.  
Bonvolu atendi. Se vi abonis en 2008 aŭ en 2009,  
vi aŭtomate ricevos informojn printempe de 2010.

Intertempe partoprenu la rekonstruadon de la kulturdomo !

### Kovrilpaĝoj

Kastelon Greziljono pentris  
Marie-France Ménanteau  
dum someraj staĝoj.

Niaj komputoroj uzadas nur liberajn kaj senpagajn programojn,  
sen escepto, dank' al Linukso Ubuntu. Nia programo por enpaĝigi  
estas Scribus 1.3.3 perfekte funkcia en Esperanto.

## Kulturaj Kajeroj JARO 2009, NUMERO 3-4

### HISTORIO DE LA KULTURDOMOJ

Sub la granda kverko de Greziljono ..... p. 58  
*Memoraĵoj de pioniroj; Atentu la ŝtupon!*  
*Prigreziljonaj Historiaj Humuraĵoj.*

### KLERIĜADO

Lingviko : *La Nova Modo* : « -ujo » ..... p. 65  
Historio : *Esperantistoj proksime al Baugé en junio 1940* ..... p. 69  
Literaturo : *Tri Historiaj Romanoj* ..... p. 75  
Gimnastiko : *Matena Korpa Vekiĝado* ..... p. 81

### DISTRIGADO

Biografio de laboristo : *Eŭropa Aŭtomobilisto* ..... p. 83  
*(La Neordinara Vivo de teksisto tra la kvin kontinentoj)*  
Ludo : *Pri la enigmoj de Tutokajmono* ..... p. 87  
Sperto de esperantisto : *Vigla Dialogo* ..... p. 88  
Kanto : *Nè forgesu min* ..... p. 90

Unua eldono laŭleĝe deponita en Francujo en novembro 2009. ISSN 1272-5188

Verkintaro :

Jean Amoureux, Dominik Bertrand, Roland Delagneau, François Dhersignerie,  
Françoise Gay, Lilli Giloteaux, Lucien Giloteaux, Jacqueline Lépeix,  
Anna Löwenstein, Klod Martins, Lorenzo Tomezzoli.  
Provlegintoj : Jeanik Marolleau, Christian Rivière.  
Direktoro de la revuo : Dominik Bertrand.

# Memoraĵoj de pioniroj

Verkis  
Roland Delagneau.

## Mastrumado de la kastelo

EN 1953, S<sup>ro</sup> Micard, kiu deziris iom ripozi post la streĉaj monatoj (eĉ jaroj) travivitaj por Grésillon, petis pere de la G.E.E.-bulteno (1) helpon de paro da esperantistaj kolegoj dum la someraj ferioj. Du paroj sin proponis : gesinjoroj Ciret el Tours kaj ni el la departemento Yonne. Ni elektis julion kaj la paro Ciret aŭguston.

Ĉar nia naŭ-jara filineto Mikaela ĵus malsaniĝis pro kokluŝo, ni venis trajne kun ŝi opiniante, ke la aerŝanĝo finresanigos ŝin. S<sup>ro</sup> Micard kun sia malnova aŭtomobilo atendis nin en Baugé je nia elbusiĝo, kaj ni baldaŭ eniris en la kastelon, kies aĉeton ni (kun centoj da aliaj) ebligis.

Dum unu aŭ du tagoj S<sup>ro</sup> Micard klarigis al mi la laboron farendan, kaj S<sup>ino</sup> Micard same agis kun mia edzino Magdalena.

En tiu ekjulio loĝis kaj manĝis inter dek kvin kaj dudek personoj en Grésillon. Mi devis kiel ekonomo mendi kaj pagi la nutraĵojn kaj varojn bezonatajn. Mia edzino devis zorgi pri mastrumado. En tiu epoko ne ĉiuj dormoĉambroj estis pretaj kaj meblitaj. Ni dormis en la turo. Nur du personoj laboris en la domo : la ĝardenisto kaj la kuiristino.

Post unu semajno alvenis aŭtobuse brita grupo por restadi kelkajn tagojn en Grésillon kaj turismi en la regiono (2). Mankis puraj

littukoj por la britoj, kaj mia edzino devis rapide lavi la malpurajn en la apudrivereta lavejo, ĉar tiam ne estis lavmaŝino. Pluraj britoj plendis pri la manko de komforto, sed ilia gvidanto trankviligis nin dirante :

« Tiuj, kiuj grumblas kaj postulas pli da lukso, eĉ ne havas fluantan akvon hejme. »

La monato julio finiĝis, sed okazis striko de la fervojistoj, kiu daŭris, daŭradis tiel, ke ni devis resti en la kastelo. Do, ni decidis restadi dum aŭgusto, tiufoje pagante nian restadon kaj partoprenante la triagradan kurson kun S<sup>ro</sup> Baronnet. Fine de la kurso, ni ambaŭ sukcese trapasis la tri ekzamenojn (1<sup>an</sup>, 2<sup>an</sup> kaj kapablecan). Feliĉe, kelkajn tagojn antaŭe ĉesis la striko, kaj ni povis reveni hejmen.

## Konstruo de banejo

La sekvantan jaron (1954) denove aperis alvoko en la G.E.E.-bulteno por pretigi simplan naĝbasenon en la malodora marĉeto. Mi biciklis de la departemento Yonne ĝis Grésillon : tricent kilometrojn en du tagoj kaj duono. Mi retrovis skipon da kuraĝaj esperantistoj por plenumi tiun malpuran taskon.

Kun kvin aŭ ses personoj (inter ili mi rememoras S<sup>ron</sup> Fouski el Angers kaj S<sup>ron</sup> Benistant, inspektoro pri elementaj lernejoj en Le Mans) ni transportis per ĉarumo la grandan kvanton da ŝlimo, kiu preskaŭ plenigis la marĉeton. Antaŭ Jane Birkin ni ilustris la kanzonon *La Gadoue*.

## Karavanoj

S<sup>ro</sup> Fouski jam organizis dum unu aŭ du jaroj karavanojn okaze de universala kongreso. Sed li estis sendube iom laca, kaj li sukcesis

persvadi min, ke mi transprenu la aferon. Kompreneble la profito estis por Grésillon. Mi rehejmiĝis bicikle dum du tagoj tiufoje. Dum la tuta lerneja jaro 1954-1955 mi multe estis okupata de tiu nova posteno. S<sup>ro</sup> Fouski helpis min je la komenco.

La transportisto (busoj Lechien el Angers) zorgis pri la hoteloj kaj restoracioj. Mi rilatis kun la delegitoj de U.E.-A. ĉe la vizitontaj urboj kaj sendis cirkulerojn al la eblaj partoprenantoj. En tiu tempo ne estis eŭro, kaj ni eĉ devis kunporti la monon por pagi la hotel-estojn. S<sup>ro</sup> Raymond Schwartz, kiu laboris en Parizo en banko nin helpis por la monŝanĝo. En 1955 la U.K. okazis en Bologna.

Feliĉe, mi ricevis en oktobro 1954, tuj post la reiro bicikla, stir-licencon, kaj mi aĉetis mian unuan aŭtomobilon (jam ekuzitan Renault 4CV).

Tio ebligis al mi facile atingi urbon Angers, kie estis la startpunkto je la 5<sup>a</sup> matene. La buso estis plena post halto en Grésillon, kaj mi povis disdoni al la partoprenantoj la lirojn jam pagitajn, kiujn mi ricevis de S<sup>ro</sup> Schwartz. Tio malgrandigis la kvanton da biletoj en mia monujego, sed restis en ĝi impona sumo : kia responso! La unuan vesperon, la urbon Napoli faman pro siaj ŝtelistoj mi deziris viziti, kiel la plejparto de niaj karavananoj. Tiam mi lasis la valizeton sub la kapkuseno de samideanino tro laca, kiu restis dormi en la hotelo.

En 1956 alian karavanon mi gvidis ĝis Kopenhago. En 1957 la U.K. okazis en Marsejlo, kaj ne estis karavano. Sed en 1958 denove mi zorgis pri tria karavano por la U.K. en Mainz. Estis la lasta : poste ne estis sufiĉe da kandidatoj por plenigi buson.

(1) *Espéranto et Culture*, monata revuo de la grupo de esperantistaj edukistoj (G.E.E.).

(2) Vidu foton en K.K. 2009, n° 1, p. 2.




Foto 1. – Septembron 1954 : familio Jean Guillaume (de 1 ĝis 5), Francisko Simonnet (7), Gabriel Rougetet (11), Pierre Marly (13), André Ribot (14), Pierre Petit (15), Henri Philippe (17), René Llech-Walter (20), Paulette Gilot (22), Lucette Vierre poste edzino Négron (23), Henri Micard (26), Marie-Thérèse Micard (30), Roland Delagneau (35).

Dekstre sidas la grupo konstruanta la banejon (vidu ankaŭ en *Naskiĝo de Esperanto-domo*, p. 35).

# Atentu la ŝtupon !

Verkis Françoise Gay,  
komencantino, fine de staĝo  
en Greziljono julion 2009.

**A**LA staĝestroj :  
Ĉiujn vesperojn ĉe la nokto, kiam ĉiuj dormis, mi duŝis min. Kaj ĉiufoje ĉe la pordo estis afiŝ-tabuleto : « Atentu la ŝtupon ! »

Mi ne konis la signifon de « ŝtupo » ĉe la pordo. Do mi rigardis ĉirkaŭ mi, ĉar mi timis : kio estas « ŝtupo » ? Eble mi povis fali, mi povis gliti. Mi estis sola. Neniu povis aŭdi aŭ helpi min. Kion fari ?

Do tamen mi duŝis min, kaj nenio okazis.


Mi pensis, ke mi devos morgaŭ demandi pri la signifo aŭ rigardi en la vortaro. Sed, ĉiujn matenojn, mi forgesis. Kaj ĉe la nokto mi retrovis la tabuleton.

Hodiaŭ vendredon mi komprenis, kio estas ŝtupo, kiam Jeanik parolis pri la ŝtuparoj de la kastelo. Do estis venko !

Atentu pri la nespertaj komencantoj, kiuj ne volas aŭ ne povas kompreni... Esperanton ! Atentu !

Ŝ' 774170. '57UŠ VV47: ' - L:  
DDH U-8 1:~C-7. C~7' L' :GUŠ  
P~ L: SV. D' L: P/-D.

# Prigreziljonaj Historiaj Humuraĵoj



La leterportisto de Epineux-le-Séguin

**C**ELE al rekonstruado de la franca movado post la dua mondmilito G.E.E. (grupo de esperantistaj edukistoj) fariĝis faka sekcio de U.E.F. (Union espérantiste française) en 1945. En 1953 jam finiĝis kunlaborado per eksploda krizo, dum kiu Henri Micard ne sukcesis ludi pacigan rolon.

Tiu ĉi bildo aperis sur la kovrilpaĝo de la oficiala revuo de U.E.F. Franca Esperantisto, n° 122, oktobron-novembron 1951. Tiu numero

publikigis unu plian el la famaj entuziasmaj alvokoj de Henri Micard por konstrui nian kulturdomon. La bildo ne troigis : en la teksto Micard informis, ke jam naŭdek kvin personoj pagis sian parton kaj tridek kvar promesis tion tuj fari.

Ĉi tiu dua bildo aperis en libreto de Tibor Sekelj (vidu lin en Greziljono en K.K. 2008, n°3, p. 34) *Ridu per Esperanto*, eldonita de

Internacia

Kultura Servo,  
Zagreb, 1973.

Tiu amuza libreto kunigas multajn humurajn bildojn kaj tekstojn, per kiuj esperantistoj sprite primokas sin mem. Tibor

Sekelj unue publikigis tiujn humuraĵojn en sia revuo

*Esperanto-gazeto*,  
eldonita de I.O.E.

(Instituto por oficialigo de Esperanto), kies direktoro li ankaŭ estis.



— Jes, la kastelo estas tre bela, sed ĉu vi havas ankaŭ la fotojn de tiuj, kiuj jam enskribiĝis en la Seminarion?

## La Nova Modo : « -ujo »

Verkis

Anna Löwenstein,  
el Italujo.

**K**IAL mi insiste pludiras « Germanujo » kaj « Italujo », kiam ĉiuj aliaj preferas « Germanio » kaj « Italio »? Nu, pro pluraj kialoj. Parte ĉar « -io » ŝajnas al mi stranga finaĵo, ne kongrua kun la simpleco kaj reguleco de Esperanto. Pli pri tio poste. Sed plejparte ĉar mi ne eltenas la konfuzon, kiun la finaĵo « -io » alportis al la landonoma sistemo en Esperanto.

Kia konfuzo? Hm, kiel klarigi la landonoman sistemon en unu alineo? Mi jam dediĉis al tiu temo tutan libreton. Sed mi faros mian eblon klarigi rapide.

La landonomoj en Esperanto estas dividitaj en du grupoj. Unu grupo sekvas la modelon « Usono, usonano », la alia sekvas la modelon « Britujo, brito ». Multaj esperantistoj, kompreneble, preferas uzi « -io » anstataŭ « -ujo », kaj do diras « Britio ». La problemo estas, ke ankaŭ en la unua grupo (Usono, usonano), multaj landonomoj finiĝas per « -io », ekzemple Alĝerio, Aŭstralio, Namibio, Kolombio. Do, kiam oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per « -io », kiel scii, ĉu ĝi sekvas la modelon « Usono, usonano », ĉu la modelon « Britio, brito »? Tio gravas, kiam necesas formi la nomon de la landano, ĉar en la unua kazo necesas aldoni « -ano » al la radiko, dum en la dua necesas forigi la « -i ».

Kiam la plejmulto da esperantistoj uzis la finaĵon « -ujo » por landonomoj de la dua grupo, ne estis problemo. Ĉiuj esperantistoj

(eĉ tiuj, kiuj preferis «-io») sciis, al kiu el la du grupoj landonomo apartenas, kaj do senprobleme sciis formi la nomon de la landano. Sed nun, bedaŭrinde, kiam preskaŭ ĉiuj uzas «-io», la distingo inter tiuj du grupoj perdiĝis, tiel ke multaj esperantistoj ne plu komprenas, kiel la sistemo funkcias; efektive iuj ne plu komprenas, ke entute ekzistas du-parta sistemo.

Rezulte, oni tre ofte renkontas erarajn formojn, ekzemple «aŭstralo» aŭ «Israelio». (Se vi ne komprenas, kial tiuj estas eraraj, bonvolu legi la pli detalan klarigon en mia libreto *Konciza Klarigo pri la landonomoj en Esperanto*.)

Sed krome, la finaĵo «-io» kunportas plurajn aliajn problemojn. Ĉu la «-i-» estas sufikso? Ĝi ne similas la aliajn sufiksojn en Esperanto, kiuj normale havas la formon V+K (vokalo plus konsonanto) aŭ V+K+K. Krome, ĝi kondukas iom malsame: malkiel la aliajn sufiksojn oni ne povas uzi ĝin memstare.

La vortelementoj en Esperanto normale estas kunmetitaj laŭ travebla maniero. Ni ĉiam emfazas tiun fakton en nia reklamado: kiam ni volas konvinki la homojn lerni Esperanton, ni donas ekzemplojn kiel «mal-jun-ul-in-o» aŭ «nask-iĝ-tag-o». Tiuj kunmetaĵoj estas facile analizeblaj kaj ĉiu elemento havas sencon. Sed kion diri pri la «-i-» en Francio? Certe ne ekzemplo, kiun ni povus uzi en nia reklamado!

Mi foje aŭdas la kritikon, ke la sufikso «-uj-» havas tro da signifoj en Esperanto. Nu, ĝi ja havas tri malsamajn signifojn – kaj tamen, multe malpli ol «-io», kiu kondukas vere ĥameleone en Esperanto. «-io» foje estas uzata:

- por la nomo de scienco, ekzemple astronomio aŭ biologio, kontraste kun la nomo de la sciencisto astronomo aŭ biologo;
- por la nomo de ĥemia elemento, ekzemple ejnŝtejnio, mendelevio surbaze de la personaj nomoj Ejnŝtejno, Mendelevio;

– por la nomo de regosistemo, ekzemple demokratio aŭ monarĥio, kontraste kun la vortoj demokrato kaj monarĥo;

– por diversaj aliaj ismoj kaj ecoj, ekzemple stenografio, pederastio kontraste kun la vortoj stenografo kaj pederasto;

– kiel unu el la korelativoj;

– (sen la fina «-o») kiel infinitiva finaĵo de la verbo.

Mi scias, ke multaj esperantistoj ne ŝatas «-ujo» pro ĝia baza signifo kiel entenujo. Kaj do? Ĉu persona ŝato aŭ malŝato rilate al iu elemento en Esperanto donas la rajton modifi la lingvon – precipe kiam tiu modifo detruas la logikon de unu el ĝiaj sistemoj? Cetere, mi mem uzas «-ujo» multe pli ofte en landonomoj ol en vortoj kiaj «laktujo», «sukerujo», ktp., do por mi tio estas ĝia ĉefa signifo.

Aliaj esperantistoj kontraŭstaras la finaĵon «-ujo» pro etnismaj kialoj. Ili argumentas, ekzemple, ke ilia lando ne nomiĝu «Hispanujo», ĉar tie loĝas ne nur hispanoj, sed ankaŭ katalunoj, eŭskoj kaj aliaj. Laŭ ili, tiu problemo malaperas, se la lando nomiĝas «Hispanio». Ĉu vere?

Al mi tio ŝajnas nura ĵonglado per vortoj, pli precize per sufiksoj: provo solvi politikan problemon per manipulado de la lingvo. Farante tion, oni neniel ŝanĝas la situacion de la katalunoj kaj eŭskoj, sed oni ja terure fuŝas la regulecon de Esperanto.

Per la uzo de «-i-» oni forglitas de la facila analizebleco, kiu estas ĉefa trajto de Esperanto, al nedisigeblo simila al tiu, kiu regas en la nature evoluintaj lingvoj.

Certe, iuj neregulaĵoj jam ekzistas en Esperanto: pensu pri la serioj «redakti, redaktoro, redakcio» kaj «poeto, poemo, poezio». Tiuj tri-vortaj serioj evidente havas komunan fonton, sed la elementoj ne povas esti disigitaj; efektive la lasta konsonanto de la radikoj eĉ estas modifita. Tiuj ekzemploj, bonŝance, rilatas nur al unuopaj vortoj, kaj do ne havas sekvojn por la baza funkciado de Esperanto.

La situacio estas multe pli serioza, kiam tia neanalizebleco trafas tutan sistemon, t.e. la sistemon formi la landonomojn.

Mi rimarkas kun plezuro, ke «-ujo» komencas iometete reaperi. Inter alie, unu el la estraranoj de U.E.-A. lastatempe ekuzis ĝin, konvinkite de la argumentoj en la libro *Rusoj loĝas en Rusujo*. Multaj esperantistoj efektive komprenas, ke «-ujo» estas pli logika ol «-io», sed ili hezitas mem uzi ĝin, ĉar ili trovas ĝin «eksmoda». Nu, modoj povas ŝanĝiĝi, ĉu ne?


Se vi opinias, ke «-ujo» estas pli bona ol «-io», kuraĝu ekuzi ĝin! Estu en la fronto de la nova modo!

Por pli da informoj pri la finaĵo «-ujo», vidu:

Corsetti, Gubbins, Wennergren, de Kock, Vaha, Butler, Camacho k.a., *Rusoj loĝas en Rusujo, landonomoj en Esperanto*, Federazione Esperantista Italiana, Milano, 2007, 10,50 eŭroj ĉe la libroservo de U.E.-A.

Anna Löwenstein, *Konciza Klarigo pri la landonomoj en Esperanto, kun kompleta listo de landoj kaj landanoj*, Palestrina, 2009, 0,90 eŭro ĉe la libroservo de U.E.-A.

Tiuj libroj estas ankaŭ legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe retejo «la Bona Lingvo».



Ĉe urbo Marbella, en Hispanujo, la 30<sup>an</sup> de aŭgusto 2008.

## Esperantistoj proksime al Baugé en junio 1940

Verkis


Jean Amouroux.

**J**E LA militdeklaro en septembro 1939 ĉesigitaj estis la preparoj por okazigo de la 32<sup>a</sup> universala kongreso de Esperanto en Marsejlo (1940).

Momente ankoraŭ malfermita ĉe n° 34, strato Chabrol en Parizo, estis la sidejo de la Societo franca por la propagando de Esperanto (S.F.P.E.). Ernest Archdeacon, la maljuna prezidanto, pluloĝis sur sia jaĥto *Esperanto* en Saint-Cloud. Jean Couteaux, la ĝenerala sekretario, direktoro de la grava Pariza hospitalo Cochin, ricevis ordonon ne forlasi sian postenon. Pierre Petit, la konstanta sekretario, mobilizita en Le Mans, pluredaktis revuon *Franca Esperantisto* kaj prizorgis ĉiujn korespondaĵojn.

Pro malvenkoj de la franca armeo, la germanaj trupoj eniris en Parizon la 14<sup>an</sup> de junio 1940 kaj lasis «liberaj» nur du kvinonojn de la franca teritorio. Multaj homoj fuĝis al pli sekura milita zono, suden.

Ĉar lama, Jean Guillaume, ĉefdelegito de Internacia Esperanto-Ligo (I.E.-L.) por Francujo, ne estis mobilizita. Estante teknika direktoro de la laboratorio por la fama kuracilo «Aspro», tiam en urbo Les Lilas (Pariza regiono), li fuĝis kun personaro, ilaro kaj materialo. Dank' al unua helpo de esperantisto li fine trovis taŭgan lokon en kastelo Hunon ĉe urbo Noyant, ne malproksime de Baugé, kie li plutenis la esperantistan flamon.




Sed ni lasu lin rakonti en Esperanto :

« Jen mia raporto pri la juniaj okazintaĵoj.

« Komence de junio oni sciis, ke la germanaj soldatoj povas invadi rapide nian landon. Pro tio la angloj pensis pri eventuala foriro kaj mi iris serĉi lokon ĉe la alia flanko de la rivero Loire, kie oni povus loĝigi maŝinojn. Samideano luis al mi grenejon en farmo. Tiu loko estis en vilaĝeto tridek kilometrojn sude de la rivero Loire. Do sesdek kilometrojn de nia kastelo.

« La 14<sup>an</sup> de junio ĉiuj estroj de mia firmo estis foririntaj kaj mi restis sola kun kvardek personoj, gelaboristoj kaj geoficistoj, kiuj timis la alvenon de la germanoj. Mi ne opiniis kiel ili, sed, por ne havi gravan riproĉon, mi decidis organizi karavanon al la loko, kie mi intencis protekti la maŝinojn. Foriro dimanĉon la 16<sup>an</sup>. Ni havis naŭ aŭtomobilojn aŭ ŝarĝaŭtomobilojn. Por ŝpari benzinon la fortaj veturiloj tiris la du malgrandajn "Simca".



Fotoj 5 kaj 6. – Ambaŭ flankoj de poŝtkarto sendita de Pierre Petit al Marcel Delcourt la 25<sup>an</sup> de novembro 1939.

Tiam Pierre Petit (1904 – 1983), mobilizita en Le Mans, troviĝis ĉe kastelo Hunon en Noyant, kien li poste venigis S<sup>on</sup> Jean Guillaume en junio 1940. Tiu ĉi provis sekurigi personaron kaj maŝinojn de laboratorio « Aspro », kies teknika direktoro li estis.

Marcel Delcourt (1913 – 1986), karmemora amiko mia, estis redaktoro de *Franca Esperantisto* ekde fondiĝo de U.E.F. (*Union espérantiste française*) la 2<sup>an</sup> de aprilo 1945.

« Personoj, valizoj, nutraĵoj, bonaj vinoj foriris samtempe. Dek du personoj venis per biciklo.

« Mia fratino, kiu ĵus alvenis de Parizo, sekvis nin. Pierre Petit, kiu devis zorgi pri la nutraĵo de multaj soldatoj, alvenis ĉe ni kaj restis tie por tiu laboro. Li restis mallonge ĉar la germanoj baldaŭ alvenis.

« Pro diversaj riparoj ni bezonis du horojn por atingi la riveron en Saumur, kaj unu horon poste ni estis en la farmo.

«Mi organizis la kuirejon kaj manĝejon sur herbejo. Feliĉe, la vetero estis bela. Komunan dormejon por virinoj sur pajlo kaj matracoj. Aparte kaj saĝe la viroj sur pajlo dormis.

«Por lavi sin estis pura rivereto proksime. Mi restis tie nur unu tagon, kaj reiris al la kastelo, ĉar mi timis pro miaj delikataj maŝinoj.

«Marde, la 18<sup>an</sup>. Mi estis bonŝanca por reveni, la pontoj sur la rivero Loire ne estis difektitaj, sed estis tranĉitaj per francaj minoj kvin horojn poste. Sur la vojo, terura spektaklo. Soldatoj sen armiloj marŝis senorde. Du afrikanoj havis rideton de frenezulo. Ĉiuj estis mortlacaj. Sed estis ankaŭ virinoj kaj infanoj, kiuj forkuris sen veturiloj aŭ infanveturiloj.

«En Noyant ne plu estis pano. Francaj soldatoj estis furiozaj, ĉar ili ne havis manĝaĵojn. Unu el ili provis difekti kafejon. Oni arestis lin. Suboficiero diris al mi: "Kiu povas riproĉi al ni nian forkuron? Ni estis ofte sen kugloj kaj pafiloj. Ĉu ni povis haltigi tankojn per niaj brustoj?"

«Oni petis de mi vinon. Kvindek botelojn mi donis, sed estis eraro, ĉar la trinkemuloj estis nervozigataj kaj provis haltigi la germanojn tri horojn poste per kugloj! Feliĉe, ili ne havis kanonojn. Estis la 11<sup>a</sup> horo nokte. Per sep haŭbizoj la germanoj silentigis ilin.

«Mi aŭdis nenion; ĉar mi estis je du kilometroj kaj dormis pro granda laceco. Oni vekis min dirante, ke estas batalo en la vilaĝo. "Bone, ni vidos tion morgaŭ." Kaj mi tuj redormis.

«Je la 8<sup>a</sup> horo de la sekvanta tago mi iris al la vilaĝo. Ses domoj estis iomete difektitaj de la haŭbizoj kaj multaj vitraĵoj rompita. La germanaj aŭtomobiloj trairis la lokon kun freneza rapideco en la direkto al Saumur.

«En iu korto dudek francaj soldatoj, militkaptitaj, estis gardataj de germana gardo-staranto. La pafiloj, la francaj armiloj, rompita de la germanoj kuŝis surtere. *Ili pasis!* Ĉiu tago alportis novan aron.

«Mi loĝigis tri diversajn grupojn, inter kiuj du generaloj. La sinjoroj profitis de la kelo. Vere estis, ke ĝi enhavas abundan provizon da Burgonja vino (proksimume 600 botelojn), viskion, diversajn alkoholaĵojn, ktp.

«Mi malpravus, se mi neus la korektan sintenon de la oficiroj. Male la soldatoj, kiuj perdis sian memkontrolon – pri tio la vino ne estis tute senkulpa – sin donis al rabado. Ni rekonu, ke povus esti pli grave.

«Mia ĉeesto ĉi tie evitis multajn damaĝojn. Mi alvenis ĝustatempe por malhelpi la intencan fuŝadon de la maŝinoj. Oni jam komencis tikli ilin. Multaj litroj da oleo disverŝiĝis surteren. Pakajoj da "Aspro" kuŝis tranĉitaj. La oficejoj similis al ĉio krom al oficejoj, ĉar la germanoj manĝis kaj dormis sur matracoj en tiuj ĉambroj.

«La radio-aparato, la fonografoj, la diskoj, la vektorloĝoj ekscitis ilian deziron. En la parko ni trovis la plej strangajn kaj diversajn objektojn, precipe skatolojn de konservaĵoj kaj malplenajn botelojn. Ok tagoj de intensa laboro de la tuta laboristaro apenaŭ sufiĉis por ripari la malordon.

«Per parolado de la generalo al liaj soldatoj mi eksciis, ke la militpaŭzo estis subskribita. Tiun paroladon li faris en la korto, interrompitan de multaj krioj "Heil Hitler!" Tiun vesperon la soldatoj kantis ĝis noktomezo.

«Akirinte permesilon por veturi en aŭtomobilo, mi iris preni en Les Places la grandan familion "Aspro".

«Ni reinstalis la kastelon. Ĉiu estis kontenta retrovante sian lokon. Okazis vetkurado por akiri matracon. Ili estis disĵetitaj en ĉiujn angulojn.

«Kaj la komuna vivo rekomenciĝis, dum ni atendis la reiron al Les Lilas, kiu devas okazi la 1<sup>an</sup> de septembro. Multa laboro en perspektivo, ĉu ne?»

Estis do en junio 1940 je nur dekkvino da kilometroj de Grésillon. Tiam la esperantistoj tute ne pensis pri ĝi!

Siajn tiurilatajn notojn enmanigis al mi Jean Guillaume (1904–1985).




Foto 7. – En 1938-1939, ankaŭ Henri (maldekstre) kaj Marie-Thérèse (dekstre) Micard ne jam pensis pri Baugé. Jen ili ambaŭ instruis en la lernejo de la vilaĝo Epineux-le-Seguin.

Vidu foton de Jean Guillaume en 1954, p. 61.

## Tri Historiaj Romanoj

Prelegis Jacqueline Lépeix  
en Greziljono julion 2009.

### La Faraono

**M**I IMPROVIZAS, ĉar mi kompreneble ne relegis la tri librojn, pri kiuj mi parolos, kaj bedaŭrinde mi ne ĉion memoras. *La Faraono* ne estas romano verkita en Esperanto, ĝi estas pola romano de Bolesław Prus. Li naskiĝis meze de la XIX<sup>a</sup> jarcento, mortis komence de la XX<sup>a</sup>. Ŝajnas, ke li estis sufiĉe konata verkisto en la tempo, kiam okazis la traduko. La traduko estas de Kabe. Li estis en la generacio de Zamenhof kaj Grabowski. Tial la lingvo de *la Faraono* estas la lingvo de la komenco de Esperanto. Do vi ne trovos en ĝi neologismojn, nek vortojn tre novajn, kvankam la trivoluma libro estas dika kaj estas multo en ĝi.

Temas pri iu faraono, Ramseso la XIII<sup>a</sup>, sed oni diris al mi poste, ke neniam ekzistis Ramseso la XIII<sup>a</sup>, ke tio estas inventaĵo. Bolesław Prus vivis en Pollando okupata de Rusujo, kaj la romano estas alegorio pri la problemoj de la politika potenco, ne estas fakte historia romano sed fabelo pri la potenco.

Ramseso la XIII<sup>a</sup> komence estas kronprinco sub la regado de sia patro Ramseso la XII<sup>a</sup>, kaj kiel kronprinco li militas. Li provas kompreni, kial mankas mono en la kasoj de la reĝlando. Li supozas, ke tio venas de la pastroj, do venas de tio, ke la pastroj havas tro da potenco en « Egipto ». En la traduko, tiu lando estas nomata Egipto,

kaj la loĝantoj estas « egiptanoj ». Fine de la dua volumo aŭ komence de la tria mortas lia patro kaj li fariĝas faraono. Li kredas, ke li havas la potencon, sed efektive la potencon havas la pastroj. Tio malbone finiĝas, li mortas kaj regas la pastroj.

Tiuj pastroj estas iom strangaj, ĉar ili kredas unu dion, la dion de Izraelo. Sed ili predikas al la popolo politeismon, ĉar ili opinias, ke tio estas pli bona por la popolo, ke oni prediku politeismon. La unua amatino de Ramseso la XIII<sup>a</sup> estas hebreino. La pastroj ŝin malamas, ĉar ŝi konas la veron pri Dio. Dum la tuta rakonto la faraono evoluas, ŝanĝas plurfoje sian sintenon, sed ĉiam restas problemoj inter li kaj la pastroj.

Montriĝas dum la romano, ke la pastroj estas pli evoluintaj ol la religio, kiun ili predikas, ĉar ili havas sekretan religion inter si. Ĉu tio historie verŝajnas? mi opinias, ke ne. Estis provo de alia faraono, Amenofis la IV<sup>a</sup>, kiu estis poste nomata Akenaton. Li parte estis monoteisto, kaj Suno estis la simbolo de lia dio. Sed tio ne daŭris.

La libro estas iom longa, vi devas esti kuraĝa. Sed la lingvo estas agrabila, sen tro da malfacilaĵoj. Tamen, atentu komencantoj, oni devas sufiĉe regi la lingvon.

### *Kiel akvo de l' rivero*

Pri *Kiel akvo de l' rivero*, mi iomete pli bone memoras. Raymond Schwartz estas konata en Esperantujo kiel humuristo, ĉar li verkis multajn novelojn humurajn, kaj estris kabaredon en Parizo. En *Kiel akvo de l' rivero*, ja estas ŝercoj, vortludoj, ktp., sed estas tamen libro pli serioza ol liaj aliaj verkoj. Schwartz estis lorenano, li naskiĝis en urbo Metz en franca departemento Mozelo. Tiu parto de regiono Loreno plurfoje ŝanĝis sian naciecon. Tion li spertis dum sia vivo, li estis foje germano foje franco. Tion spertis ankaŭ lia popolo.

Komenciĝas la romano antaŭ la unua mondmilito, kaj ĝi finiĝas post la dua mondmilito. La juna heroo vivas en Parizo sed devenas de iu vilaĝo en Loreno. Tiu vilaĝo plurfoje revenas dum la rakonto, foje franca foje germana.

La junulo en Parizo festas sian bakalaŭriĝon kun la junuloj (kompreneble estas nur knaboj en tiu epoko), sed la festo estas fiaska. Poste la junulo iras al Berlino por plibonigi la regadon de la germana. Li amikiĝas kun studentoj germanaj. Estas dua festo, sed en la germana stilo. Ni povas kompari la parizanojn, kiuj festas sian bakalaŭriĝon, kun Berlinaj studentoj, kiuj estas multe pli rigoraj... Tion prezentas homo, kiu konis ambaŭ kulturojn, sed iom karikature tamen estas prezentata la afero.

La junulo enamiĝas al berlinano. Ili amoras, ŝi gravediĝas, sed li ne scias tion, ĉar li devas urĝe reveni al Francujo, pro la komenco de la unua mondmilito. Li lasas ŝin, kaj li sukcesas, en milito jam komencita, atingi Francujon, per la helpo de la vilaĝanoj de Loreno. La amatino estas graveda, sed ŝi estas amata ankaŭ de Berlina studento. Dum la festo de la germanaj studentoj estis konflikto inter la franco kaj tiu germano, kiu amas la saman junulinon. La germana studento estas morte vundita en la milito, kaj li proponas sur sia mortolito ŝin edzinigi. Ŝi pensas: « Kion fari? Mi havas bebon en la ventro, la patro estas franco, ni estas en milito. » Ŝi jesas.

Ŝi naskas filon, pri kiu ne tro interesiĝas la germana familio. Tiun filon oni edukas kiel en la spirito de prusa militarismo, ĉar oni supozas, ke li estas filo de heroo de la milito. Poste venas nazioj, kaj tiu filo fariĝas oficiro de Wehrmacht. Hazarde (sed hazardon regas la verkisto kompreneble), li militas en la regiono de tiu Lorena vilaĝo. Li rezignas pri sia oficira rango kaj fariĝas simpla soldato. Fine de la milito li estas adoptita de la franco, fakte de sia patro, kaj ili amikiĝas. Eĉ poste, li ne scias, ke li estas lia filo, ĉar ŝajnas ke li iom

hontas pri sia pasinteco de prusa oficiro. Krom oficiro li estis inĝeniero, kaj li laboras en fromaĝ-fabriko de la franco en la vilaĝo en Loreno.

Fine iam la patrino venas al Parizo por zorgi pri malriĉuloj, kaj ili vidas ĉe la televido intervjuon pri ŝi. La junulo diras : « Jen ŝi estas mia patrino. » La franco diras : « Sed ŝi estas mia edzino. » (Kvankam lia edzino ŝi neniam estis.) Tiam ili komprenas, retrovas ŝin, la gepatroj vivas kune fine, kaj fino bela, ĉio bela.

Kompreneble la konkludo estas pacista. Mi aldonas, ke mi vivis longe en regiono Alzaco, kaj tial la problemoj de vilaĝoj, kiuj ŝanĝas sian naciecon, estas de mi konata. Mi memoras, ke la nazioj ŝanĝis la nomon de vilaĝoj kaj ankaŭ de homoj.

Tiu libro ne estas por komencantoj. En la stilo de Schwartz, mi memoras ke estas vortludoj, kaj ankaŭ tiaj vortludoj, kiuj estas pli bone komprenataj, se oni konas kaj la francan kaj la germanan lingvojn, sed tamen ili estas klarigitaj. En tiu libro celo ne estas la vortludoj, celo estas tamen la rakonto kaj, per la kazo de Loreno, prezento de la problemoj de paco kaj milito.

Mi diras la komenton de Marie-Thérèse Lloancy. Pasintsemajne ŝi diris, ke ĉe la unua legado ŝi ne ŝatis, ĉe la dua ŝi pensis : « Eble... » kaj ĉe la tria legado ŝi ŝategis. Do legu trifoje.

### La Ŝtona Urbo

Anna Löwenstein estas britino, edzino de Renato Corsetti, ŝi vivas kun li en Italujo. Ŝi studis pri Romia historio, ŝi verkis du historiajn romanojn, kiuj estas sufiĉe dokumentitaj. En *Morto de artisto* estas longa bibliografio en la latina. Ambaŭ romanojn ŝi verkis en la angla, kaj poste mem tradukis. Ŝi antaŭe aktivis pri feminismo en Esperantujo. Ŝi aktivas ankaŭ pri ateismo, oni vidas tion en la libro.

La historio okazas dum la Romia epoko, fine dum la rego de Nerono, komence dum Klaŭdio. La ĉefa rolulino rakontas sian vivon, fikcie kompreneble. Estas mi-romano.

En la unua parto, ŝi vivas en sia vilaĝo en Britujo, ŝi havas fianĉon britan. Estas priskribo de la moroj de ŝia kelta tribo. En tiu epoko britoj faris homajn oferojn, sed ne ofte. En la rakonto oni ofertas maljunulinon al la dioj keltaj, por ke ili helpu kontraŭ romianoj. Finiĝas la unua parto per alveno de Romiaj soldatoj, kiuj kaptas ŝin kun aliaj vilaĝanoj, detruas ŝian vilaĝon, kaj portas ŝin al Romo.

La dua parto estas pri la vivo de tiu britino, kiu estas sklavino en Romo. Por ŝi estas mirinda tiu urbo. Tial nomiĝas la romano *la Ŝtona Urbo*. Ekzemple ŝi ne scias, kio estas ŝtuparo. Ŝtona urbo antikva estas priskribata tra la okuloj de barbarino. Ŝi demandas sin, kiel la romianoj povas vivi, se ili ne havas la festojn de la kelta religio : se ili ne festas, kiel povas la mondo daŭri? Komence ŝi imagas, ke oni oferos ŝin al la Romiaj dioj, kaj poste ŝi tamen plu vivas.

La tria parto estas pri kristanismo en la epoko de Nerono. Ŝi ne edziniĝas, ĉar sklavoj ne edziĝas, sed ŝi havas kunulon, kiu estas kristano, klera homo, skribisto, sed tamen sklavo. Interalie li kopias epistolojn de sankta Paŭlo. Sed li tute ne konsentas, li trovas, ke sankta Paŭlo estas frenezulo, ke tiu ideo, laŭ kiu Kristo estas filo de Dio, estas absolute freneza. La aŭtorino faras pri sankta Paŭlo akran portreton, laŭ vidpunkto de ateisto. Sankta Paŭlo ne konsentas kun sankta Petro, iliaj du skoloj interbatalas.

Ekas la granda incendio en Romo, kiu ludas rolon ankaŭ en la dua romano de Anna Löwenstein. Tie ĉi ŝi havas grandajn konsekvencojn por kristanoj, ĉar Nerono akuzas ilin pri la incendio pro politikaj motivoj. La britino kaj ŝia kunulo havas filon, kiu estas fervora kristano. Li estas cirkumcidita, ĉar tiam judoj kaj kristanoj ne bone dividiĝis. La incendio estas bona afero por la filo, ĉar la

kristanoj kredas, ke estas la fino de la mondo, ke poste venos Kristo, ke estos regno de paco, kaj de ĉio, kion vi volas sur la Tero! Bedaŭrinde Kristo ne revenas. La kristanoj estas persekutataj, ĉar oni taksas ilin krimuloj pro la incendio, kaj la predikistoj devas klarigi, kial ne okazas la fino de la mondo.

La patro tiam rezignas pri kristanismo, por savi sian vivon. La filo kaj lia edzino restas fervoraj kristanoj, kaj volas morti kiel martiroj, por iri al paradizo. La patrino opinias, ke kristanismo estas komparebla al ŝia kelta religio, ĉar ankaŭ estas homaj oferoj: la filo volas oferi sian vivon al dio.

Anna Löwenstein verkis kontraŭ kristanismo, sed la romano estas sufiĉe dokumentita, kaj ĝi estas antaŭ ĉio rakonto.

Pri la stilo, Anna Löwenstein estas fundamentista, ŝi ne volas uzi vortojn, kiuj ne estas en la Fundamento, sen klarigi ilin en glosaro. Tiu romano, kvankam ne tro komplika, ne tiom dika, kiom *Morto de artisto*, tamen ne estas por komencanto.

Plej grandan historian seriozecon havas la *Ŝtona Urbo*. Kiel akvo de l' rivero kaj la Faraono celas instrui ideon. En *Kiel akvo de l' rivero*, historio estas nur preteksto por pacismo unuflanke (la konkludo estas «Kia stultaĵo la milito!») por amhistorio aliflanke: ne intervenas Hitler, Goering, intervenas nur fikciaj homoj. Pacismo kaj amhistorio estas interligitaj: se ne estus milito, la franco ne devus forlasi la germaninon, ktp.

La celo de tiu improviza prelego estis precipe luda: kion vi memoras longtempe post legado de klasikaĵoj? Estas interese kompari la efikojn de nia komuna kulturo inter ni. Eble K.K. publikigos pliajn ludajn «recenzojn», eĉ pri sama verko, se ekludos aliaj legintoj.

Kompreneble ni vole ne korektis erarojn pri la intrigoj!

## Matena Korpa Vekiĝado

Verkis

François Dhersignerie.

Tiu praktikado baziĝas sur la principoj de tajĝiĉjŭano. Celo estas vekti korpan sentivecon per malstreĉo de muskolaj kuntiriĝoj, kaj kunigi korpan malstreĉiĝon kun mensa sinkoncentrado, kies fokuso estas la movofarado.




Foto 8. – Duan staĝsemajnon en julio 2009. Suno suriras frue super Greziljono. Gvidanto François Dhersignerie (maldekstre) kaj staĝanoj praktikas matenan korpan vekiĝadon.

Ĉi tie tajĝiĉjŭano donas sian karakteron de fortigado de korpa tonuso kaj ne sian militan aspekton.

Movoj devas esti malrapide kaj kontinue farataj tiel, ke ili ebligu konscion pri dinamika funkciado de la korpo : apogoj, artikoj, vertikala akso, ekvilibro, ktp.

Spirado kunligita kun movoj donas fluecon, kvietecon kaj mildecon.

Ĉiu praktikas laŭ sia propra ritmo aŭskultante internajn korpajn sentojn, malkovrante siajn proprajn kapablojn sen ilin perforti, kaj irante renkonte al bonstato.



Foto 9. – Dum staĝo «Paco kaj Esperanto» la unuan semajnon de julio 2009, François Dhersignerie gvidas tajĝiĉjŭanon, en la ombro de la Greziljonaj arboj.

## La Neordinara Vivo de teksisto tra la kvin kontinentoj Eŭropa Aŭtomobilisto

Verkis  
Klod Martins.

**S**OMERON 1959. Tuj post la fino de laboro Klod kaj Renée ekiras al Norvegio, ili iras tra Belgio, aŭte tranoktas en Nederlando, iras tra Deĉlando kaj Danmarko, kaj ŝipas de urbo Hirtshals ĝis urbo Kristiansand. La kapitano de la ŝipo invitas la paron por manĝi.

Ĉe urbo Odda Klod petas de Renée foti lin sub akvofalo. Pro muskoj li glitas el rando de klifo. Feliĉe li alkroĉas siajn manojn al roketo, dum liaj piedoj pendas en aero! Survoje al urbo Bergen, folklore kostumitaj geedzoj invitas la paron al bankedo.

En parko de Oslo Klod senvestiĝas nude antaŭ publiko por pluki lotuson por Renée! Vespere en luksa restoracio la paro ne sciante la lingvon elektas hazarde : supon, ovon kaj teon. Sekvantan tagon ĉe urbo Mandal por baniĝi la paro devas kun helpo de infanoj depreni multajn meduzojn.

Someron 1960. Je la 18<sup>a</sup> horo Renée alvenas en la fabriko, kie Klod estas direktoro, alkroĉas sian biciklon, kaj la paro tuj foriras aŭte tra Belgio. Sekvantan tagon ili alvenas en Jugoslavio, kie la aŭto Citroën 2CV bezonas dekon da minutoj por preterpasi buson, tiom la deklivo estas kruta!

En Slovenio, ili vizitas la grotojn de urbo Postojna, en Hrvatska (Kroatio) la dek kvar lagojn de Plitvice, kiuj falas unu en la alian. Klod petas pri la vojo al urbo Jajce, sed oni sendas lin tra tiel aĉa vojeto, ke Renée devas ĵeti ŝtonojn en la apudan abismon.

Benzin-stacioj estas skribitaj sur la mapo, tiom ili estas maloftaj! Jen unu, sub amaso de pajlo! Necesas sendi knabon al kampo por venigi la deĵoranton. Tiu ĉi per ĉizilo kaj martelo malfermas barelon, enmetas tubon, enspiras buŝe, kaj elĉerpas proksimume dek kvin litrojn, kiujn li verŝas en ladan kruĉon kaj tra funelo en la aŭton.

Ĉe urbo Praĉa la loĝantoj frakasas barilon, por ke la paro povu tendumi sur herbejon. La paro en magazeno aĉetas oleon por salato, sed fakte uzas ĝin por la motoro. Sekvas ilin pli ol cento da homoj! La tablo de la butikoj estas nigra pro miloj da muŝoj... sur la piroj.

Dum supreniro en minareto dekoj da infanoj sekvas. Ne eblas mal-supreniri! Klod provas, sed amaso de korpoj falas en la ŝtuparo!

Survoje al urbo Peĉ kvadrata kloako baras la vojon! Klod metas ŝtonajn blokojn por trapasi. En tiu sen-aŭta regiono oni uzas ĉarojn kun radegoj du metrojn larĝajn. Eniro en Peĉ dum la nokto ŝajnas stranga, ĉar la blindaj domoj ne havas fenestrojn.

La paro tranoktas aŭte en arbaro, kvankam Klod scias, ke estas ursoj tricent-kilogramojn pezaj. Dumnokte je la tria matene la paro vek-iĝas pro bruego, kaj tra la fenestro vidas dikajn formojn moviĝantaj... Je la sunsuriro ili konstatas, ke estas bovinoj. Uf!

Post Skopje en Makedonio, per forta deklivo la aŭto alvenas supren en monto, premante dekojn da nigraj cikadoj! La paro lasas la aŭton por piediri ĝis vilaĝo Galiĉnik. Virinoj estas vestitaj per longaj roboj el ŝafa lanaĵo blanka, kaj sur la brustoj portas tri sinsekvajn vestojn broditajn kun kupraj butonoj. Estas iliaj unikaj vestaĵoj, kaj dum festoj ili aldonas zonon ornamitan per grandegaj arĝentaj moneroj grekaj. La viroj portas ŝvelajn blankajn pantalonojn el ŝafa lano.

Ree en urbo Travnik Klod volas uzi malpli longan vojon, sed tiu vojaĉo havas tiom fortan deklivon, ke li devas uzi la unuan rapidumon, dum Renée piede ĵetas abismen arbajn branĉojn, kiuj baras la vojon kovratan de herboj.

Fine la paro alvenas en Italion kaj, lasinte la aŭton sur ponto de urbo Venezia, vizitas la faman urbon sur gondolo movata per longa stango. Post tri tagoj da pluvego, la paro vizitas la Rejn-akvofalon Rheinfall.

Aŭguston 1961. La paro trairas Espajnon. Ĉar liaj ŝuoj dolorigas piedojn, Klod, ekvidante fontanon sur placo de urbeto, bremsegas, eliras el la aŭto, subakvigas siajn vestitajn piedojn, kaj plu veturas. Gapantoj mirantaj opinias, ke temas pri frenezulo.

La aŭto trairas riveregon Guadiana sur boato por eniri en Portugalon.

Klod ĉe vojkruciĝo eligas sian kapon por pridemandi du junulinojn, kiuj staras fenestre ĉe la unua etaĝo, pri la vojo al urbo Moura. Li malfermas la pordon de la malnova Citroën 2CV, kaj li apogas sian brakon sur la seruron. Sed li kutimas verŝi akvon sur la tolan tegmenton de la aŭto por malvarmigi la internon. Apogante sin sur la pordo li klinas la aŭton, kaj ricevas la tutan akvon sur sian vizaĝon! Tiam la junulinoj tiom ridas, ke ili ne povas respondi, kaj Klod elektas iun vojon hazarde.

Dum banado ĉe urbo Setúbal ŝtelisto frakasas la vitron kaj ŝtelas la fotilon kaj la tualetujon de Renée, sed ne prenas la ŝorton de Klod plenan je biletoj! Klod havas tiom maldikan postaĵon, ke la ŝtelisto opiniis, ke temas pri ŝorto de knabo.

Tamen pro la okazaĵo la paro tuj revenas al Francio. Ili preterpasas multe da aŭtoj, tial Espajnaj policanoj haltigas ilin. Klod montras sian legitimilon pri « Aŭtomobil-klubo » kun franca flago, kaj diras: « Ne, ne, ne, ne. » La policanoj rezignas!

Someron 1962. La geedzoj trairas Eŭropon, kaj en Jugoslavio veturas sur unu el la maloftaj asfaltitaj vojoj. Dumnokte ili renkontas sur ĝi amason da sablo, kokinoj, hundoj, katoj, senlumaj bicikloj, kaj grupojn da homoj sidantaj ronde kaj trinkantaj ŝaj-on (teon)!

Post urbo Niŝ la aŭto atingas la doganon de Bulgarija (България) fermatan per fera kurteno sur radoj. Klod montras multe da dokumentoj, legitimiloj, ktp., kiuj konsistigas libron dikan kiel telefona jarlibro. El ĝi la doganisto elprenas nur trionon de folio! Sed li tute ne traserĉas en la aŭto, kie kuŝas granda lanaĵo, kiu povus kovri mitralojn.

Sur vojo al Sofia (София) du policanoj sur motorcikloj alvenas laŭ kontraŭa direkto sur aŭtovojo sen-aŭta, kaj akompanas antaŭen la aŭton Citroën montrante per brako la pseŭdajn belajaĵojn.

En urbo Istanbul, en Turkije, la paro vidas kvar virojn, kiuj metas sur dorson de maljunulo pezegan keston. Alia portas ok dikegajn korbojn, kaj alia dek du seĝojn. « Forta kiel turko » ne estas legendo.

La aŭto trairas markolon Bosporo sur boato. Ĉe urbo Ŝile la paro baniĝas en Nigra Maro. Renée pridemandas pri vojo virinon, kiu lavas unu filon. Klod lavas la duan.

Post urbo Ankara la aŭto eniras en Kapadokion sur tavolo de polvo, kaj en « valo de Luno » ili admiras belegajn formojn de ŝtonegoj. Malnovaj *kilise* estas preĝejoj pentritaj en grotoj antaŭ 1200 jaroj. En unu el ili Renée verŝas sitelon da akvo en tombon kaj lavas sin.

En vilaĝo Ortahisar la monto estas tute kavita per trogloditaj loĝejoj, kies dekono estas daŭre loĝata. Aliaj ŝtonegoj havas formon de penisoj kaj aliaj de kastelaj turoj.

Sekvota.

Glosoj : Bulgarija : Bulgarujo  
 Danmarko : Danujo  
 Deĉlando : Germanujo  
 Espajno : Hispanujo  
 Norge : Norvegujo  
 Portugalio : Portugalujo  
 Turkije : Turkujo

## Pri la enigmoj de Tutokajmono

Verkis

Lorenzo Tomezzoli.

J AM en sia praepoko, la antikvaj egiptoj ŝatis trinki alkoholon :

ⲓⲡ ⲙ ⲥⲁ ⲡⲣⲁⲡⲕⲁ, Ⲛ: ⲛⲧⲕⲕⲕⲕ  
 ⲓⲡⲧⲧⲧ ⲥⲧⲥ ⲧⲕⲕⲕ : Ⲛⲧⲕⲕⲕⲕ

Nun jen aldonajaĵoj de Tutokajmono por kontentigi la skribistojn.

1. En « pro, por, tri, tre... » la « grincanta r » estas nur duonkonsonanto, kaj en « pli, polvo, klaĉo... » ankaŭ la « glitanta l » estas duonaĵo. Duonkonsonanto neniam naskas silabon, sed daŭrigas ĝin :

|     |   |   |   |   |     |            |     |        |     |
|-----|---|---|---|---|-----|------------|-----|--------|-----|
| 1/2 | B | C | Ĉ | D | ... | L          | ... | R      | ... |
|     | Ḃ | Ḅ | Ḅ | Ḅ | ... | L' aŭ L aŭ | /   | Ḃ aŭ ~ | ... |

2. Jen stranga rimedo elpensita de la faraono por krei iom da mistero :

|     |     |    |    |    |    |    |
|-----|-----|----|----|----|----|----|
| an' | in' | ur | id | io | on | en |
| Ḃ   | Ḃ   | Ḃ  | Ḃ  | Ḃ  | Ḃ  | Ḃ  |

Finfine, ĉu vi rekonas la unan tekston, en tia mistera skribmaniero ?

ⲓⲡ ⲙ ⲥⲁ ⲡⲣⲁⲡⲕⲁ, Ⲛ: ⲛⲧⲕⲕⲕⲕ  
 ⲓⲡⲧⲧⲧ ⲥⲧⲥ ⲧⲕⲕⲕ : ⲛⲧⲕⲕⲕⲕ

Vidu la unuajn partojn en K.K. 2009, n° 1 kaj n° 2.

# Vigla Dialogo

Verkis  
Lucien Giloteaux.

**D**UM staĝo en Grésillon eblis al kandidatoj trovi kaj mem elekti konversacian temon por trapasi la parolan parton en Esperanto de la tiama « internacia atesto pri kapableco ».

Konsentite kun la ekzamenistoj mi do proponis travivaĵon lige kun « eventeto » : mia unua vojaĝo al Britujo, kaj al eksterlando !

Jen resumo de la dialogo inter George Bernard Shaw, verkisto, dramisto, skeptikulo, kaj franca junulo, hazarde en 1948 en Ayot St Lawrence.

« S<sup>ro</sup> Shaw, vi ja interesiĝas pri lingvoj. Kion vi opinias pri Esperanto ?

– Ne bona ! (*No good!*) Mi ricevis multajn similajn projektojn, kaj mi scias ĉion pri la temo. La gramatiko de Esperanto ne estas sufiĉe facila...

– Ĝi havas dek ses regulojn sen esceptoj...

– Ne insistu. Mi konas ĉion pri Esperanto.

– Do, kiun lingvon vi proponas kiel internacian ?

– *Pidgin English*, parolata de Aziaj komercistoj kaj multaj personoj en la mondo.

– Jes, sed ĉu taŭgas por teatra verkisto kiel vi ?

– Tiam, se ne estus neregulaj verboj, eblus elekti aŭ la hispanan aŭ la anglan lingvon. La hispana lingvo por paroli...


– Jes, sed Esperanto... Zamenhof estis...

– Ne, ne insistu. »

Shaw vigle manpremis min, kaj ni adiaŭis.

Tia malfavora sinteno ne malkuraĝigis min. Post unua artikoleto en regiona nordfranca ĵurnalo, sekvis, dum jardekoj, Esperanto-aktualaĵoj : miloj da artikoloj kaj informoj (pri Zamenhof, kongresoj, somerkursoj kun partoprenantoj el multaj landoj, Grésillon, ktp.).

Krome, al nacia vespera gazeto mi riskis sugesti : « Kial ne aperigi unu informon ĉiutage pri Esperanto en Francujo kaj en la mondo ? » Ĉifoje mi malsukcesis, kaj la rezulto estis vere negativa.



Monaĥejo The Friars en urbeto Ayleford, Anglujo.

# Ne forgesu min

♩ = 60

Piano

lam

ne for-ge-su min ĝi es-tas nom' de be-la

MI 7

flor' ne for-ge-su min

lam

por mi ĝi es-tas re-me-mor' di-ris mi al

LA 7

vi ja vi fo-rir-as sed de nun

MI 7

ki-am for-est-os la for-tun' vi sci-os ke, en vi-a kor're-flo-ros la be-le-ta

90

Kulturaj Kajeroj 2009

Kanto

Muziko kaj paroloj : Lorenzo Tomezzoli

lam

flor' de ti-am pa-sis lon-ga temp'

lam

MI 7

kaj fi-ne venis la prin-temp' a-pe-ris vi, ki-el la

lam

SOL 7

su-no kaj re-ko-men-cis sub ĉi-el'

lam


MI 7

fa-vo-ra por ni-a fa-bel' no-ve-ga viv'

lam

kaj no-va a-mo no-ve-ga

91



## Ne forgesu min

1. Ne-forgesu-min', ĝi estas nom' de bela flor', ne-forgesu-min'.  
 Por mi ĝi estas rememor' ; diris vi al mi :  
 Ja vi foriras, sed de nun kiam for-estos la fortun'  
 Vi scios, ke en via kor' refloros la beleta flor'.  
*Rekantaĵo.* De tiam pasis longa temp', kaj fine venis la printemp'.  
 Aperis vi, kiel la suno,  
 kaj rekomencis sub ĉiel' favora por nia fabel'  
 Novega viv' kaj nova amo, novega viv' kaj nova amo.
2. Ne-forgesu-min', la nom' de tiu bela flor', ne-forgesu-min',  
 Eterne restos en la kor' ; tiel brilas ĝi,  
 En la etoso de l' esper' kiel juvelo de tener',  
 Ĉar por ni tia re-aper' resonos kiel milda kver'.  
*Rekantaĵo.* Ne gravas pri l' perdita temp', ĉar fine venis la printemp'.  
 Aperis vi, kiel la suno,  
 kaj rekomencis sub ĉiel' favora por nia fabel'  
 Novega viv' kaj nova amo, novega viv' kaj nova amo.

## Verku Kulturajn Kajerojn

*Kial vi ?*

Ĉar en niajn paĝojn

Ne venas komencantoj kun eminentuloj, ne instruistoj kun lernantoj,  
 sed homoj kun homoj.

*Pri kio ?*

Por la parto « Historio de kulturdomoj » :

Studu la (eĉ proksiman) pasintecon de via preferata kulturejo ;  
 Rakontu ĝin kiel eble plej neŭtrale, ne per opinioj sed per faktoj ;  
 Ne provu priskribi ĉion : elektu simplan temon, klaran atakangulon.

Por la parto « Kleriĝado » :

Klerigu nin per viaj fakaj scioj.

Por la parto « Distriĝado » :

Distru nin per rakonto originala kaj zorge konstruita  
 aŭ per iu ajn artaĵo.

*Sed ne pri kio ?*

Ĉar ni celas kleriĝadon, emancipadon, ni nenion publikigu pri :  
 politiko ; religio ; ekonomio ; pseŭdoscienco...

Krome estos rifuzitaj :

jam konataj tekstoj ; (plejofte) tradukaĵoj ; (nepre) krudaĵoj.

*Kiel ?*

Ĉe ni « verki » signifas : skribi, desegni, fotadi, komponi tuton...

Sendu vian proponon al

Dominik Bertrand, 7, rue des Brulis, 77320 Jouy-sur-Morin, France

« nasf2008@orange.fr ».